Superrigardo pri KODEJO
Jaro 2010

Tutmonda Esperantista Junulara Organizo

Nieuwe Binnenweg 176
3015 BJ Rotterdam
Nederlando

Sub respondeco de Łukasz Żebrowski
Prezidanto de TEJO

Aleks Baudry

30/08/2011

Enhavo

1. Enkonduko 2
2. Respondoj 2
3. Membraro 4
4. Pritakso de la agado 6
5. Estraro 7
6. Informiloj 8
7. Interna komunikado 9
8. Renkontiĝoj 10
9. Konkludo 12

1. Enkonduko

Jam por la tria fojo aperas la demandaro KODEJO (Kompleta Demandaro por Esperantaj Junularaj Organizoj), kies celo estas doni pli klaran bildon pri la stato de la landaj sekcioj de TEJO, kaj havi aktualajn datenojn pri ili. Ĉi-jare 33 el la 45 landaj junularaj asocioj respondis al la demandaro, kompare al 25 en 2009 kaj 19 en 2008[1]. Ĝojige konstateblas ke pli kaj pli da asocioj partoprenas en ĝi.

La enketo estis malferma al respondeculoj de la landaj sekcioj en decembro kaj januaro, tiel ke la informoj estas ankaŭ uzeblaj por ĝisdatigi la informojn de la Jarlibro, ŝparante unu informkanalon. La enketo estis respondebla ĉefe tra la reto dank' al formularo, kiu aŭtomate plenigis guglan kalkultabelon.[2]

Oni devas singardi de tro evidentaj kaj facilaj konkludoj trarigardante la rezultojn ĉefe ĉar granda proporcio de la demandoj estas subjektivaj aŭ postulas precizajn konojn kiujn la respondintoj ne necese plene regas je momento de plenigo de la formularo.

2. Respondoj

La jenaj asocioj respondis al la enketo:

Argentina Esperantista Junulara Organizo (ArgentEJO), Austria Esperanto-Junularo (AEJ), Flandra Esperantista Junulara Asocio (FLEJA), Brazila Esperantista Junulara Organizo (BEJO), Junularo Esperantista Brita (JEB), Junulara Esperantista Burunda Organizo (JEBUO), Ĉeĥa Esperanto-Junularo (ĈEJ), Dana Esperanta Junulara Organizo (DEJO), Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO), Junulara Esperantista Franca Organizo (JEFO), Germana Esperanto-Junularo (GEJ), Hispana Esperantista-Junulara Societo (HEJS), Hungara Esperanto-Junularo (HEJ), Junulara Esperanto-Ligo Israela (JELI), Itala Esperantista Junularo (IEJ), Japana Esperanto-Junularo (JEJ), Kataluna Esperanto-Junularo (KEJ), Korea Esperanto-Junularo (KEJ), Kroatia Esperanto-Junulara Asocio (KEJA), Junulara Sekcio de

1 Ne ĉiu respondintoj estas landaj sekcioj de TEJO (kiel la Meksika Esperanto-Junularo)
2 Ĝi estis ankaŭ sendita poŝte al kelkaj landaj sekcioj kies aliro al reto estas problema.

Kuba Esperanto Asocio (JSK), Litovia Esperantista Junulara Ligo (LEJL), Meksika Esperanto-Junularo (MEJ), Nederlanda Esperanto-Junularo (NEJ), Norvega Junularo Esperantista (NJE), Pola Esperanto-Junularo (PEJ), Rusia Esperantista Junulara Movado (REJM), Slovakia Esperanta Junularo (SKEJ), Sveda Esperantista Junulara Unuiĝo (SEJU), Junularo Esperanta Svislanda (JES), Junulara Organizo de Togolandaj Esperantistoj (JOTE), Ukrainia Ligo de Esperantista Junularo (ULEJ), Usona Esperantista Junularo (USEJ), Vjetnama Esperantista Junulara Organizo (VEJO). [3]

La demandaro bonvenigas por la unua fojo la respondojn de AEJ, HEJ, JSK, LEJL, MEJ, REJM, kaj JES, kaj ankaŭ tiuj de JEJ kaj JOTE, kiuj respondis en 2008 sed ne en 2009. 16 asocioj respondis al la 3 demandaroj. Aliflanke, IREJO (Irana Esperantista Junulara Organizo) ĉi foje ne respondis.

Por 10 el la 22 asocioj kies nomo aperis jam en 2009, respondis la sama homo. Tiu ĉi informo estas sufiĉe grava, ĉar donas ideon pri la kvalito de la komparo inter jaroj, ĉefe por subjektivaj demandoj. Tamen por 4 asocioj estas la sama homo kiu respondis dum la tri jaroj.

Diagramo 1 kaj 2: Stato kaj evoluo de la stato de la organizo



La diagramo 1 montras ke pli ol duono de la respondintaj asocioj sinkonsideras aktivaj. Kiel oni vidas en la diagramo 2 tiu proporcio estas pli malpli konstanta, kvankam la nombro kreskis (de 11 en 2008 al 13 en 2009 kaj 18 en 2010). Pli okulfrapa estas la pligrandigo de la nombro de dormantaj asocioj, malavantaĝe al tiuj de la vekiĝantaj.

Tiuj ŝanĝoj klarigeblas simple: El la dormantaj asocioj pli ol duono estis asocioj kiuj ne respondis dum la antaŭaj jaroj. Samtempe, 5 asocioj kiuj antaŭe respondis „vekiĝanta“, ĉi-foje respondis „aktiva“.

El la 18 aktivaj asocioj, nur 8 estas „konstante“ aktivaj, al kiu aldoneblas 3 asocioj kiuj respondis la samon, sed ne plenigis ĉiujn 3 demandarojn.

Kvankam tiuj ciferoj estas informplenaj, oni devas singardi de tro rapidaj konkludoj, ĉefe

3 Por eviti konfuzojn, en tiu ĉi dokumento la mallongigoj de la Kataluna kaj de la Korea Esperanto-Junularoj estos respektive KatEJ kaj KorEJ. Tamen atentu ke tiuj mallongigoj ne estas oficialaj.

ĉar tiu demando estas tre subjektiva. Ĉefe senteblas ke la pritakso de la bonfarto de la asocio ŝanĝas kiam ŝanĝas la respondanto.

Diagramo 3: Financa stato de la landaj sekcioj

3. Membraro

La pritakso de la membraro de la landaj sekcioj estas tre malfacila tasko, kaj bezonus apartan atenton, pro pluraj kialoj. Unue ĉar ĉiuj landaj sekcioj havas sian propran metodon por kalkuli tiujn membrojn, kiu ne aŭtomate samas tiu de la kotizpagantoj. Due, ĉar ĝi forte dependas de la grandeco de la lando, kaj aliaj faktoroj, kiel la vigleco de la movado, kaj subteno de nejunulara organizo, inter aliaj. Oni ankaŭ povas supozi ke la ekzisto de renkontiĝoj, dum kiuj eblas akiri rabaton se oni membras, ludas gravan rolon.

Diagramo 4 kaj 5: Membroj kaj kotizantaj membroj

Membroj



Kotizantaj Membroj



Noto: Ne respondis JEFO kaj SEJU

La asocioj kiuj deklaras la plej multo da membroj estas JEBUO, ĈEJ, GEJ, HEJ, PEJ, REJM.

Tabelo 1: Evoluo de la nombro de membroj kaj kotizantaj membroj

		2009 - 2010							
		Membroj				Kotizantaj membroj			
		Malkresko	Stabileco	Kresko	Tuto	Malkresko	Stabileco	Kresko	Tuto
2008 - 2009	-	5	3	1	9	3	6	4	13
	Malkresko	1	1	2	4			1	1
	Stabileco	3	4		7	5	2	1	8
	Kresko	1	1	2	4	1	1		2
	Tuto	10	9	5	24	9	9	6	24

Estis pritaksitaj kiel stabilaj la evoluoj kiuj ne superis ±10% de unu jaro al la alia. Rimarkeblas ke la ciferoj estas disaj, tio signifas ke ĉiuj asocioj spertas malsamajn evoluojn.

Oni devas tamen substreki la dujaran malkreskan tendancon kiun spertis BEJO (de 99 en 2008 al 89 en 2009 kaj 50 en 2010), kaj je la alia flanko, kreskon por KorEJ kaj JEBUO.

Resume, oni povas konsideri ke 10 asocioj havas kreskantan membraron dum la tuta periodo, kiam 6 estas en la mala stato.

Rilate al varbado de novaj membroj, la tabelo 2 listigas la plej kutimajn kanalojn. Estas malfacile taksi ĉu ĝi estas kompleta, ĉar povas okazi ke la respondito ne havis enkape ĉiujn manierojn por reklami pri sia landa sekcio je momento de plenigo de la formularo (ĉar temas pri malferma demando). Rimarkindas la granda proporcio de neesperantistaj aranĝoj.

Tabelo 2: Kiel vi varbas novajn membrojn

Tipo da varbado	Landaj sekcioj	Nombro
Ne-esperantajn eventojn	BEJO, JEB, FEJO, JEJ, JSK, NEJ, NJE, SKEJ, JES	9
Kursoj	BEJO, FEJO, IEJ, JEJ, PEJ, VEJO	6
Amaskomunikiloj/reklamoj	ĈEJ, KEJA, JSK, NEJ, ULEJ	5
Persona kontakto	FLEJA, BEJO, HEJ, NJE	4
Regula kunveno	AEJ, JEFO, KorEJ, PEJ	4
Retaj kursoj	ĈEJ, IEJ, PEJ	3
Prelegoj	ĈEJ, PEJ, JOTE	3
Forumo	JEB, PEJ	2
Kluboj	JEBUO, USEJ	2
Retpaĝo	ĈEJ, PEJ	2
Familio	IEJ	1
Retlistoj	JEBUO	1
Retmesaĝoj	BEJO	1
Speciala membrokategorio	GEJ	1

Noto: Ne respondis ArgentEJO, DEJO, HEJS, IREJO, JELI, KatEJ, LEJL, MEJ, REJM, SEJU

Fine menciindas ke por plej multo de la asocioj la kutima membriĝo estas 1-foja jare. (26), aŭ membreco sen kotizo (por 3 el ili).

4. Pritakso de la agado

En la demandaro por 2010 aperis nova serio de demandoj, kun la temo „kiel vi taksas vian agadon“.

Diagramo 6: Kiel vi taksas vian agadon



Noto : Rilatoj NJO signifas « rilatoj kun nejunulara organizo ».

La diagramo montras malsamajn tendencojn depende de la demando. Montriĝas ke la engaĝiĝo de volontuloj la varbado kaj ĉefe la rilatoj kun la nejunularaj organizoj estas la plej bone taksitaj.

Diagramo 7: Rilatoj kun aliaj esperantaj organizoj

Interesa estas kompletigo de la diagramo 6 kun la diagramo 7 pri rilatoj kun aliaj organizoj,

kiu montras ke la plej kutima kaj normala rilato estas kun la nejunulara organizo.

5. Estraro

Jen kelkaj informoj pri la estraroj de la landaj sekcioj.

Diagramo 8: Kiom longa estas la estrar-periodo

Diagramo 9 kaj 10: Kiam elektiĝas kaj kiom da homoj en la estraro





6. Informiloj

Tabelo 3: Kiujn informilojn via asocio havas/uzas

Respondoj	Asocioj	Nbr
Ne havas	LEJL	1
Propran paperan eldonon	BEJO, JEJ	2
Rubrikon en aparta revuo (ekz. nejunulara)	JEB, JEBUO, ĈEJ, DEJO, JEFO, GEJ, JELI, IEJ, KatEJ, KorEJ, NJE, PEJ, REJM, JOTE, VEJO	15
Propran elektronikan eldonon	ArgentEJO, BEJO, ĈEJ, GEJ, HEJ, JEJ, NJE	7
Retan dissendon	AEJ, JEBUO, ĈEJ, JEFO, HEJ, IEJ, JEJ, KatEJ, KEJA, NEJ, REJM, SEJU, VEJO	13
Retpoŝtan diskutliston	ArgentEJO, BEJO, JEB, ĈEJ, DEJO, FEJO, JEFO, GEJ, HEJ, JELI, IEJ, JEJ, KatEJ, NJE, PEJ, REJM, SKEJ, SEJU, USEJ, VEJO	20
RSS-n	DEJO, GEJ, IEJ, PEJ, SEJU	5
Paĝon aŭ grupon ĉe Facebook	AEJ, FLEJA, BEJO, JEB, ĈEJ, JEFO, GEJ, HEJS, HEJ, JELI, JSK, NEJ, PEJ, SEJU	14
Konto ĉe Twitter	JEB, GEJ, JEJ, PEJ	4
Forumon	JEB	1
Alia	JEFO, PEJ, ULEJ	3

Noto: Jen la respondoj por „Alia“, ĉiumonata informfolio (de 1 ĝis 4 paĝoj) (JEFO), kontoj/grupoj ĉe sociaj retoj nk.pl (PEJ), grono.net kaj esperanto.com (PEJ), grupo en Vkontakte (ULEJ); Ne respondis LEJL kaj JES

Rilate al informiloj, daŭre konstateblas la malapero de paperajn gazetojn. Kompare al 2009, GEJ kaj FEJO agnoskas ke ne plu aperigas ĝin, kvankam GEJ estas inter la asocioj kiu aperigas retan version.

Interretaj medioj pli kaj pli estas uzitaj, ekzemple Twitter por JEB kaj PEJ, kaj RSS por DEJO kaj SEJU. Rilate al retpoŝtaj dissendoj kaj dissendlisto la rezultoj estas iom konfuzigaj, ĉar multe da asocioj deklaris uzi tiujn mediojn lastfoje sed ne ĉi-foje, dum kiam aliaj agnoskas ke ili ekuzis ĝin. Povas signifi ke konstanta plurjara uzo de tiuj medioj estas afero malcerta.

Diagramo 11: Aperreguleco de la informoj



Rilate al aperreguleco rimarkindas ke pli kaj pli oftiĝas la aperigo. Nur 1 asocio menciis 1 ĝis 2fojan aperon jare, kontraŭ 5 lastjare.

Diagramo 12 kaj 13: Enhavo de la retpaĝo, kiom ofte ĝi refreŝiĝas:

Enhavo de la retpaĝo

Kiom ofte ĝi refreŝiĝas



Noto: ne respondis JEBUO, LEJL, MEJ, JES, JOTE

Neniu granda ŝanĝo rilate al retpaĝoj. La respondoj pri la enhavo ne ŝanĝis multe de unu jaro al la alia. La ofteco de la refreŝiĝo ne vere kompareblas kun 2009, pro ŝanĝo de la demando.

7. Interna komunikado

Diagramo 14 kaj 15: Ofteco de la retaj kaj fizikaj kunvenoj

Retaj

Fizikaj

Proporcie estas daŭre malpli da landaj sekcioj kiuj uzas la reton por siaj kunvenoj (75% en 2010 kompare al 80% en 2009, 85% en 2008). La plejmulto retkunvenas malregule, kiel montras la diagramo 12. Rilate al reguleco de la fizikaj kunvenoj, ĝi ne unuavice vere rilatas

al grandeco de la lando, sed pli al kutimoj. La plej aktivaj landaj sekcioj emas renkontiĝi pli ofte, kiam unufoja kunveno pli oftas ĉe vekiĝantaj asocioj.

8. Renkontiĝoj

Tabelo 5: Organizitaj renkontiĝoj de la landaj sekcioj

Tipo	**Asocioj**	**Nbr**
Aranĝoj/Renkontiĝoj (< 4 tagoj)	AEJ, FLEJA, BEJO, JEB, JEBUO, ĈEJ, FEJO, GEJ, HEJ, JELI, IEJ, JEJ, KatEJ, JSK, NJE, PEJ, JOTE, ULEJ	18
Aranĝoj/Renkontiĝoj (≥4 tagoj)	BEJO, JEFO, GEJ, HEJ, IEJ, KEJA, PEJ	7
Seminarioj/trejnadoj/kursoj	JEBUO, FEJO, JEFO, KorEJ, NJE, PEJ, SEJU, JOTE, ULEJ	9
(Lingvaj/Kulturaj) festivaloj	JEBUO, JEFO	2
Ne-esperantaj eventoj	ArgentEJO, ĈEJ, DEJO, JEFO, KatEJ, ULEJ	6
Aliaj	NJE (Kafumado), SEJU (lokaj stokholmaj renkontiĝoj)	2
Ne organizis	LEJL	1

Ne respondis: MEJ, REJM, SKEJ, JES, USEJ

Tabelo 6: Kunlabore partoprenitaj renkontiĝoj

Tipo	**Asocioj**	**Nbr**
Aranĝoj/Renkontiĝoj (< 4 tagoj)	ArgentEJO, JEB, JEBUO, ĈEJ, FEJO, GEJ, HEJS, JEJ, KatEJ, MEJ, NJE, SKEJ, SEJU, JOTE, ULEJ, USEJ	16
Aranĝoj/Renkontiĝoj (≥4 tagoj)	ĈEJ, JEFO, GEJ, IEJ, PEJ, SKEJ, ULEJ	7
Seminarioj/Trejnadoj/Kursoj	ArgentEJO, JEBUO, ĈEJ, GEJ, KorEJ, MEJ, SKEJ	7
(Lingvaj/Kulturaj) festivaloj	JEB, ĈEJ, DEJO, GEJ, NEJ, PEJ, SKEJ	7
Ne-esperantaj eventoj	AEJ, JEBUO, KatEJ, PEJ, ULEJ	5
Ne partoprenis	LEJL	1

Ne respondis: FLEJA, BEJO, HEJ, JELI, KEJA, JSK, REJM, JES

La tabelo 5 klare montras la gravan oftecon de la okazigo de mallongaj renkontiĝoj, kiu povas esti organizita flanke de pli grava(j) aranĝo(j), seminarioj(j) aŭ kurso(j) dum la jaro. Tutlogike rimarkebla estas ke ĉefe en la plej fortaj asocioj, kie troviĝas plej multe da membroj, estas organizitaj pli-ol-4 tagaj aranĝoj.

Membroj de landaj sekcioj ankaŭ kunlabore partoprenas kaj aktive kontribuas al aranĝoj organizitaj de aliaj asocioj, kiel prezentitaj en la tabelo 6. Plej ofte temas pri malpli-ol-4-tagaj aranĝoj, sed ankaŭ (lingvaj/kulturaj) festivaloj kaj aliaj ne-esperantaj eventoj, cele de informado.

Tabelo 7: Kunorganizo aŭ aktiva partopreno en renkontiĝoj

Asocioj	Organizitaj aranĝoj	Partopreno en aliaj aranĝoj
ArgentEJO		
AEJ	Temaj matenmanĝoj	Journey to the End of the Night
FLEJA	PSKK; kuirada renkontiĝo	
BEJO		
JEB	Tendumado; Volontulado ĉe Londona Lingva Ekspozicio	
JEBUO	Finlernojara festo; seminario en aŭgusto kun la landa asocio; konkurso kun islama religio	
ĈEJ	Jarkuveno; Kvinjariĝo de la asocio; unutaga evento por novuloj; unutagaj aranĝoj far lokaj asocioj (Prago, Brno).	Esperanto-muzeo (Svitavy); eksterlandaj esperanto renkontiĝoj
DEJO		Roskilde
FEJO		
JEFO	FESTO; lokaj kursoj/seminaroj/diskutrondoj en Parizo, Liono kaj Strasburgo.	La Homara Festo
GEJ	JES; KEKSO	
HEJS	Iberia Renkontiĝo	
HEJ	IJS; JER; ĉiu-monate duon-tagan programon; du-tri tagaj renkontiĝoj por esperantistoj de najbaraj landoj.	
JELI	vesperaj renkontiĝoj	
IEJ		
JEJ	KS	
KatEJ	Internaciisma renkontiĝo en Reus; Okazigado de prelegoj en la kataluna (Kataluna Socia Forumo)	
KorEJ		
KEJA	MIRO	
JSK		15a Metiejo en la kampadejo Jakabo Abajo
LEJL		
MEJ	Aranĝoj kune kun Meksika Esperanto-Federacio	
NEJ	Roots festival	
NJE		
PEJ	Kunvenoj de PEJ; JES; Zamenhof festo	Arkones; Scienca Pikniko en Varsovio: Esperanto-budo (PEA en Varsovio kun PEJ); Scienca Festivalo en Krakovo: Esperanto-stando (krakovaj studentoj kun helpo de PEJ-anoj el aliaj urboj); Ekonomia Forumo en Krynica
REJM		
SKEJ	Tutslovakia renkontiĝo kun SKEF	SES kun E@I; lingvofestivalo dum eŭropa tago de lingvoj kun diversaj institutoj
SEJU		
JES		
JOTE	JOTE ĉiam partoprenas kaj organizas kulturajn festivalojn dum ĉiuj TEK	
ULEJ	UKREA prezidkunsido 1-2 tagoj; JES (kontribuis en programo), kune vojaĝis tra Eŭropo (7 personoj)	
USEJ	Renkontiĝo ĉe Loka Kongreso de Esperanto-USA	
VEJO	Printempa renkontiĝo; Naskiĝtago de la asocio; Zamenhof tago	

9. Konkludo

Konklude al tiu ĉi superrigardo, estas pozitiva afero ke 10 pliaj asocioj partoprenis al la demandaro. Konsiderante la pli grandan proporcion de vekiĝantaj kaj dormantaj asocioj, konstateblas la pludaŭron de la grandaj tendancoj jam rimarkitaj kadre de la antaŭa KODEJO.

Espereble tiu ĉi superrigardo donos la ĝustan signalon pri la farto de via propra landa sekcio, kaj donos al vi la necesajn ilojn por plibonigi ĝiajn agadojn. TEJO daŭre pluaperigos tian demandaron, kiu certe pluevoluos laŭ la ricevintajn komentojn, kadre de ĝia strebo plivigligi komunikon inter ĝiaj landaj sekcioj.